

Tagiĝo 19

*Neregula cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dĉm osvĉty, odbor Esperanto, Opava – 1954/VII,
adr.: Kuznĉk, J. Rooseveltova 17, Opava*

Tutŝtata kunveno de junularo en Hradec ĉe Opava.

Jam post kelkaj tagoj la 31-an de julio kaj 1-an de aŭgusto kuniros la Esp. junularo el nia respubliko por pridiskuti la laboron, kiun ni dum unu jaro de lasta kunveno en Hradec ĉe Opava faris, kaj por pridiskuti nian pluan organizitan agadon. Ni devas solvi novajn problemojn, kiel pliaktivigi niajn junularajn grupojn, plifirmigi la kunlaboron kaj doni al si novajn taskojn per nia laboro.

Sabate, la 31-an de julio preparas junularoj siajn programojn por amuzi la alvenintojn. Ankaŭ sabate estas kunvokata la preparkunveno de ĉefdelegitoj de regionoj, kie estos precize difinita la programo de agado en la dimanĉa kunveno.

Mi atentigas la regionperantojn, ke ili preparu la raportojn pri siaj grupoj, kiun ili dum la kunveno tralegos. Temas pri ĉiuspeca agado – ekzemple pri la aranĝitaj kursoj, kia estis la vizitado en la kunvenoj, kie la grupoj kunvenadas, kiajn malfacilaĵojn ili havas, kiajn pli gravajn entreprenojn dum la jaro ili efektivigas. Kia stato en la grupo estis antaŭ unu jaro, kaj kia estas hodiaŭ. Kiom da anoj havas grupo, kaj kiam el ili estas membroj envicigitaj en la tutŝtata junulara konkurso. Kiom el ili havas laŭ lingvoscio kategorion A, B, C, D. Kian planon havas grupoj por la plua agado.

Regiona delegito poste taksos entute la laboron de grupoj en sia regiono kaj difinos sian pluan agadplanon.

Sian raporton sendu ankaŭ / se estas neeble alveturi/ s-ano Chlubnová pri la kulturagado dum la pasinta jaro de nia laboro, kaj kio estas necese fari por plialtigi nian kulturnivelon en la estonto.

Junularperanto de MEM - s-ano Ŝkvrna preparu raporton, kio estis farite sur la kampo de pacmovado.

Raporton pri la agado en Slovakio inter junularo preparu s-ano Neubeller, kaj se estas neeble alveturi, peste la raporton ĝustatempe alsendu.

Ĉiujn lokajn delegitojn mi petas, ke ili ankoraŭ hodiaŭ prilaboru siajn raportojn laŭ punktoj antaŭe skribitaj, kaj tuj ilin forsendu al sia regiona peranto kaj kopion al Centrejo en Opava, al s-ano Kuznĉk Jaroslav, Rooseveltova 17.

Raportojn sendu ankaŭ grupoj, kiuj ne estis envicigitaj en la konkurso de junularo en ĈSR. Ni esperas, ke ĉiuj grupoj konscios la gravecon de junulara movado kaj ke ili plenumos la postulitan, eĉ se ili al la kunveno en Hradec ne povas veni.

Mi petas grupojn, ke ili helpu al nia organizado de junularo ankaŭ per tio, ke ili sendu siajn opiniojn pri la ĝisnuna laboro, kiajn ŝanĝojn ili dezirus, kion ili dezirus plibonigi kaj tiel plu.

Sulceso de la tutŝtata kunveno en Hradec ne dependas nur de la organizantoj, sed ĉefe de la grupoj kaj de iliaj rimarkoj.

La kunveno estu vere laborkonferenco el kiu ni disiru kun nova entuziasmo por plua laboro.

